FLANDRA UNUIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ.

KATHOLIEK VLAAMSCH ESPERANTOVERBOND

MAJO 1938

---

Aldono Flandra Katoliko N°.5

---

Estimataj Gesamkredanoj,

La ricevo de tiu ĉi cirkulero eble mirigos vin. Ĝi ne anstataŭos nian Flandra Katoliko'n N°.6, sed pro neantaŭvideblaj malfacilaĵoj kun nia antaŭa presisto, la organizo de la tuta laboro ĉe nova presejo, kiu kompreneble postulas iom da tempo, kaj la necesa komuniko de urĝaj sciigoj, devigis al ni uzi tiun komunikilon.

Kiel vi jam rimarkis nia revuo estas survoje - sub la lerta gvidado de nia nova ĉefredaktoro - iĝi pli kaj pli interesa kaj taŭga. Ni do petas al vi paciencon; je apero de Flandra Katoliko N°.6, tute nove aranĝita kaj vestita, vi ne bedaŭros la necesan prokraston.

La Sekretario

Bijvoegsel aan Flandra Katoliko N°.6.

Bij ontvangst van dit omschrijven zult U misschien verwonderd zijn. Het vervangt echter niet ons Flandra Katoliko N°.6, maar om niet te voorziene moeilijkheden met onze vorige drukker, het organizeeren van het gansche werk bij een nieuwe drukkerij, wat natuurlijk wat tijd vraagt, en de noodzakelijkheid dringende mededeelingen te doen, waren we verplicht dit middel te gebruiken.

Zooals U reeds hebt opgemerkt, wordt ons maandblad -onder de kundige leiding van onze nieuwe hoofdopsteller- meer en meer belangrijk en deugdelijk. Wij verzoeken U wat geduld te hebben, en bij het verschijnen van Flandra Katoliko N°.6, gansch nieuw geschikt en in een nieuw kleedje, zult U zich het uitstel niet berouwen.

De Sekretaris.

RADIO LOKSBERGEN : Wij trekken er de aandacht onzer leden op dat van af Maandag I6 Mei, het Esperantopraatje, verzorgd door onze vereeniging in voormeld zendstation, elke week en telkens op Maandag te I8 uur zal doorgaan.

KOTIZO F U K E POR I938 - F U K E BIJDRAGE VOOR I938 : Ek de la I. 5.38 la kotizo por I938 estas Fr.IO,- por anoj de KVEV. (ricevos aperontajn Fl.K.) Fr.5,- por enloĝantaj anoj. - Por esti ano de FUKE. oni krome pagas la kotizon internacian kiu restas Fr.5,-, kaj kiu rajtigas je ricevo de la Jarlibro IKUE.I938. - Pagoj de tiuj Fr.5,- post la I.II.38 rajtigas je <u>mencio en</u> kaj <u>ricevo de</u> Jarlibro IKUE.I939.

Vanaf I.5.38 wordt de bijdrage voor I938 : Fr.IO,- voor leden van het KVEV. (ontvangen Fl.K.) en Fr.5,- voor inwonende leden. Om lid te zijn van FUKE, betaalt men bovendien de bijdrage IKUE die op Fr.5,- vastgesteld blijft, en die recht geeft op <u>ontvangst</u> van het Jaarboek IKUE.I938. - Betaling van die Fr.5,- <u>na</u> den I.II.38 geeft recht op <u>vermelding in</u> en <u>ontvangst van</u> het Jaarboek IKUE. I939.

FLANDRA ESPERANTO KONGRESO EN BRUGGE : Je la Pentekostotagoj (4-5 kaj 6 junio) okazos en la mondfamkonata kaj mezepoka arturbo Brugge la 9a Flandra Kongreso Esperantista.

La kongreso estos ega sukceso ĉar la programo enhavos i.a.: Vizitado de la mezepoka urbo kun ĝiaj belegaj malnovaj preĝejoj kaj aliaj konstruaĵoj;kun ĝiaj mondfamaj muzeoj kun pentraĵoj de Van Eyck kaj Memlinck;kun ĝiaj multaj kanaletoj kiuj donis al ĝi la nomon de "Venecio de la Nordo".

Ankaù artvespero ,sonorilarkoncerto,sportfesto (piedpilko- kaj aliaj ludoj) balo,sekciaj kunvenoj kaj ekskurso al la mezepoka Damme estas sur la programo.La geesperantistoj kiuj dezirus partopreni la kongreson estas petataj senprokraste pagi la kotizon (Fr.I2,-por anoj de FLE.por aliaj Fr.I5,-)pere de konto 4407.30 je nomo de Maria Vincke,kongresa kasistino.

FUKE.prizorgas la S.Meson,kiu okazos en la kapelo de la S. Sango,Burgplaats.En la S.Meso predikos sacerdota moŝto Dro.J.De Coene,dro.de Filozofia kaj Filologia sciencoj.

LA JARKUNVENO DE FUKE.OKAZOS JE LA I6a.h.EN SALONO DE LA "GILDE",OUDENBURGSTRAAT,(malantaù la Belfrido).NI PETAS KE ĈIUJ KATOLIKAJ PARTOPRENANTOJ DE LA KONGRESO CEESTU NIAN FUKE JARKUNVENON. - Por pliaj informoj de la kongreso skribu al "sekretariejo de la kongreskomitato,Komvest 70.Brugge.

BRAREKO - REGIONTAGO EN BERGEN OP ZOOM : En Nederlando niaj samkredanoj estas jam tiel nombraj, ka ili povas sukcese organizi regionajn kongresojn.Tiajn kongresojn en la provinco Nordbrabanto organizas la Brareko (Brabanta regionkomitato).

Okaze de sia 650 jara ekzistado la urbo Bergen-op-Zoom organizos ĉisomere multajn belajn festojn kaj en la kadro de tiuj festoj "Nia Katolika Idealo" (sekcio de N.K.en Bergen op Zoom) prizorgos regiontagojn.Ne unu tagon,kiel ordinare,sed oni jam komencos la Sabaton antaùe,ankaù tial ke oni esperas ke multaj flandraj samideanoj partoprenos al la regiontagojn.La datoj de tiuj tagoj estas la IIa kaj I2a de junio,kaj jen la programo :

Sabaton : I5 h. Bonvenigo — I8 h.Brabanta komuna manĝo
I6 h. Historia procesio — 20 h."Antikva Bergen"

Dimanĉon : I0 h.Diservo en la kapelo de la Juvenato de l'S.Koro (Antwerpsche str.)en kiu predikos Patro L.Roosen teologia korespondanto de I.K.I.
II h.Brareko-kunveno,
I2 h.Lunĉo
I3 h.-precize - rondveturado sur la Skeldo,
I5 h.Vizito al la Urbo kaj vidindaĵoj -muzeo,la iama markiza kastelo,urbdomo,St.Gertruda Preĝejo, Zamenhofmonumento.
I8,30 h.Festena tagmanĝo,
20 h.en "Thalia" aù "Antikva Bergen"

Pluajn informojn donas Sro.J.Oerlemans,Oude Wouwschebaan 38 - Bergen op Zoom.
Niaj FUKE-anoj estas amike invitataj multnombre partopreni al tiu regiontago.

JARKUNVENO DE NEDERLANDA KATOLIKO EN BREDA LA 22an DE MAJO :

La jarkunveno de N.K.ĉijare okazos en Breda, tiel ke ankaŭ niaj FUKEanoj el la norda parto de provinco Antverpeno povos partopreni. Jen la programo :

IO,I5 h.Kantata S.Meso en la Kweekschool,Oranjeboomstraat
II,30 h.Unua parto de la jarkunveno en "Concordia",van Cocthplein (bij het begin van de Baronielaan)
I3 h.Paŭzo.Dum la paŭzo okazos en "Concordia" komuna kafotablo brabanta ( I guldeno)
I4,40 h.Dua parto de la kunveno.
I7,30 h.Ekskurso per aŭtobuŝoj al Meerselsche Dreef- Belgujo apud la limo;tie oni vizitos la belegan ĝardenon de la brunaj patroj (ekskurso-kostoj : 65 cendoj).La aŭtobuŝoj veturos ĝis kastelo Bouvigne.Meerselsche Dreef troviĝas tute apud la limo,sed sur belga teritorio,je proks.I Km.maldekstre de la granda ŝoseo Oostmalle - Breda,ĉe la rivero Mark. Ni atentigas niajn anojn el norda Antverpeno ke tiu vizito de niaj nederlandaj samkredanoj povas esti bela okazo por ekskurso al Meerselsche Dreef,por tie en agrabla sfero renkonti la N.K.anojn.

Kiuj intencas partopreni al la jarkunveno de N.K.sin anoncu al Sro.G.van der Heijd,Zeisstraat 38 - Breda.

VENDINSTITUTO : Karaj Gesamideanoj - Nun ke nia Unuiĝo estas en malfacilaĵoj mallongaj pro ŝanĝo de presisto,ni urge petas ke vi subtenu vian vendinstituton per multopaj mendoj,tiel kovrante la grandajn elspezojn kiujn kunportas prezistŝanĝo.

Mendu librojn diversajn el la ĉi suba listo :

| | |
|---|---|
| Plena Vortaro de Esp. (klarigo de la vortoj en Esp.) | Fr. 73,- |
| Granda Vortaro Van Straaten | 80,- |
| Konciza Vortaro " " | 40,- |
| Fundamento Krestomatio - Zamenhof. | I8,- |
| Lingvaj respondoj - Zamenhof | 7,50 |
| Proverbaro esperanta - Zamenhof | 7,50 |
| Verda Koro - J.Baghy ( ege facila romano) | I6,50 |
| Kompleta serio de Muusses Esperanto Biblioteko - IO ekz. | 4I,- |
| Glumarkoj - po IOO | 5,- |

Bijvoegsel aan "Flandra Katoliko" December 1937

KOMERCA PRESEJO : H. & H. BRAEKEVELT — ROESELARE (BELGLANDO)

★


# PRESISTO & KLIENTO

PERIODA CIRKULERO EN LINGVO ESPERANTO POR NIA KLIENTARO EN FLANDRUJO, VALONUJO KAJ EKSTERLANDO

## L E T E R K E S T O

**S-ro L. P., studento en V.** — Presaĵoj ĉiam kaptas mian atenton. Bonvolu klarigi la labormanieron de la modernaj ornamoj tiel ofte - kaj belguste - uzataj en viaj esperantistaj presaĵoj. Sendube estas pacienclaboro sentina ordigi tiom da apartaj punktetoj kaj kvadratetoj ?


RESPONDO. — Efektive, provizo da pacienco estas necesa, sed eble ne tiom kiom estas supozebla. Vi sciu ke unu punkteto aŭ kvadrato aparte ne ekzistas. Diversaj punktetoj aŭ kvadratetoj kune formas certan figuron. Vidu la sekvantajn ekzemplojn :



La serio ne ankoraŭ estas kompleta, kvindekon da diferencaj figuroj ni lasas trankvile en la literŝrankoj.

Antaŭ ol ekkomposti necesas prepari samgrandan skizon, por plej facilmaniere "konstrui" la bildon.

La ideala aŭtomobilo por la partoprenantoj al Esper. kongresoj.



**S-ro S. P., sekr. de la Esp. Gr. en B.** — 1) Vi petas nin modelon de la "plej praktika invitkarto" por la novfondita sekcio. La plej praktikan modelon ni ne povas elekti kun la certeco ke ĝi plaĉos, tial ni sendas 4 presitajn modelojn, Vin petante mem elekti. Kun la modeloj ni sendas la prezojn je mendo de 500 aŭ 1000 ekzempleroj.

2) Dankon pro perado de la mendo "vizitkartoj" por 5 membroj el via sekcio. La litertipo indikita estas tre plaĉa ; efektive tiu tipo estas elektita de dekoj da Esperantistoj kiuj jam mendis ĉe ni.

**F-ino M. v. d. P., Csehkursanino en L.** — Plezure ni plenumas vian peton, kaj sendas al Vi 3 ekz. de nia trikolore presita cirkulero de pasinta jaro. Ne gravas ke ili tiun fojon ne estos uzataj je reklama celo, sed por alsendo al viaj korespondantoj en eksterlando. Vere plaĉa ideo per kiu ili estos informataj pri almenaŭ unu kazo de komerca reklamo en Esperanto. — Ni ankaŭ je sama celo kunsendas 10 ekz. de la nuna cirkulero. Sed..., kion fari se hazarde via "kara japano" mendus vizitkartojn en sialandaj signoj. Pripensu nun jam afablan rifuzon...

**Al multaj.** — Specialan dankon al la korespondantaj estraranoj el diversaj grupoj kaj organizaĵoj kiuj en tiu pasinta periodo ŝarĝis nin kun la ellaboro de mendoj : ni resumas laŭ rememoro : Cseh-centron, Mechelen — E. R. Bruselo — F. U. K. E. Borgerhout, Aalst, Wilrijk — F. G. E. Antverpeno — F. L. E. Bruselo — F. E. I. Kortrijk — Handzame — Luik — Oostende — Leuven (Heverlee) Blankenberge — Brugge — Roeselare — Turnhout — Meenen — k. a.

Krome dankon al la esp. komercistoj kiuj bonakceptis nian antaŭan - specialan - reklamon, kaj kiuj restas klientoj pro la facileco akiri ĉe ni koresponde siajn presaĵojn, belstilajn kaj favortarifajn, kun la certeco de bonfida interrilatado.

Komercistoj — Elspezo de leterafranko por informpeto ne estas senutila. Risku kaj iĝu konvinkata je propra profito.



LA KRIO DE L' KOKO :

Saĝaj homoj — ne vane mi kriu...uu
Presejon Braekevelt vi nune preferu...uu

**KOMERCA PRESEJO H. & H. BRAEKEVELT**

STATIEDREEF, 177 — ROESELARE — TEL. 1080

S-ro & S-ino Kamp-Durma

PARKSTRAAT, 36 MONDURBO

Modelo 1

★

Guido De Ridder

Bank-oficisto

Kerkstraat, 34 Nieuwstad

Modelo 2

**piet dejonkere**

**ontvanger der belastingen**

oude-sparrenlaan

steenberge

Modelo 3

GERTRUDE VAN SOEST

OOSTDUINLAAN, 12 WESTERBEEK

Modelo 4

*Preseĵo H. & H. Braekevelt, prezentas al sia klientaro sian vizitkartcirkuleron 1938*

Estimata,

La samcela cirkulero de l'antaŭa jaro ĝuis favoran akcepton ĉe la Esperantistoj kaj iliaj konatuloj. Estus tre domaĝa neglekto se nunjare ni ne reeldonus ĝin, tial ni prizorgis ĝian aperon, eĉ kun certa plibonigo.

**Celo** — Ni konas la deziron de la Esperantistoj posedi belan vizitkarton kun verdstela insigno. Tamen, tia akiro postulas enuigan informadon, ĉar ne ĉiuj presistoj disponas pri konvena insigno, kaj kutime tro-altigas la prezon por la speciala verda preso.

**Modeloj** — Krom la apude presitaj modeloj ni tutbone ellaboras aliajn modelojn laŭ prefero de la mendanto.

**Mendo** — Precize difinu la deziratan kvanton, modelon.

**Pago** — Akompane kune kun la mendo (ne-uzitaj poŝtmarkoj), aŭ prefere post ricevo de la sendaĵo per poŝtĉeka pago (nia num. 4049.82)

Tarifo - KARTOJ.

| | 50 ekz. | 100 ekz. | 200 ekz. |
|---|---|---|---|
| Sen verda stelo : | 6 fr. | 9 fr. | 15 fr. |
| Kun verda stelo : | 9 fr. | 12 fr. | 18 fr. |

Tarifo - KOVERTOJ.

| | 50 ekz. | 100 ekz. | 200 ekz. |
|---|---|---|---|
| Sen verda stelo : | 2 fr. | 4 fr. | 7 fr. |
| Kun verda stelo : | 5 fr. | 7 fr. | 10 fr. |

Sendkostoj : 0.50 fr.

Konigu la enhavon de tiu cirkulero al familianoj, amikoj, en via grupo, kolektante ĉion en unu sola, orda mendo. Okaze de kolektiva mendo, la mendanto ĝuas agrablan kondiĉon.

Estimplene salutante,

*H. & H. Braekevelt*

GRAVA

La prezoj ofertataj validas ankaŭ dum la tuta jaro 1938. Konservu do la cirkuleron ĝis kiam via kart-provizo estas elĉerpata. — Tamen, multaj ŝatos la kartojn okaze de Kristnasko kaj Novjaro.

Ni konsilas do ne atendi ĝis paro da tagoj antaŭ tiuj festoj, sed nun prepari la mendon. La laboro por ni estos faciligata, kaj vi mem profitos el la rapida liverebleco.

Preferu nian adreson por ĉiuj viaj presaĵoj esperantlingvaj, familiaj kaj komercaj — Fidindaj kaj fakściaj atestoj.